

## Vojaĝo al Sarasina

Al mi en koro ekblovis la aŭtuna vento, senĉese instigante min vidi vilaĝojn de Sarasina kaj lunon sur la monto Obasute [t.s. forĵetejo de maljunulinoj]. Estas ankaŭ unu homo, kiu kune frenezas de natura pejzaĝo, nomiĝas Etuzin. S-ro Kakei akompanigis kun ni sian serviston, timante, ke la vojo Kiso estus plena de danĝero kun densaj arbaroj en montoj, ke survoje eĉ dormi en paco estus malfacile. Klopodadis elkore ĉiuj, tamen ne sciante sufiĉe nek pri la ĉefvojo kaj nek pri stacioj, kune estante necertaj. Estis multe da ridindaĵoj dum la vojo tute malorda kaj senvica.

En iu loko ni renkontis ĉirkaŭ sesdek jaraĝan bonzon, mornan, morozan, ĉiam malparoleman, kiu portas surdorse ion tiel pezan, ke la lumbo kurbiĝas, kaj anhelas rapide, piediras en paŝoj tre etaj. Miaj akompanantoj, kompatante lin, kunligis lian pakajon kun la sian surŝultran, kaj ŝargis per ĝi ĉevalon, kaj ankaŭ min rajdigis sur ĝin. Ne estas trankvile sur la selo pro tio, ke supre la kapo pendas amasiĝinte altaj montoj kun strangaj krestoj kaj maldekstre fluas granda rivero kun kruta profundega klifo, kaj nenie troviĝas ia peco de loko glata. Tial do neniam ĉesis timo pro danĝero. Trapasante lokojn Kakehasi [t.s. trabopontetoj], Nezame [t.s. vekiĝo], ni iris laŭ la montokoloj Sarugababa [t.s. maneĝejo de simioj], Tati [t.s. staranta], onidire, kun 48 da kurbiĝoj, estas tiel multe da kurbiĝantaj padetoj, ke, al mi ŝajnas, kvazaŭ mi iru laŭ nuba vojo. Eĉ irantoj piede kapturiniĝas, timigate, ŝanceliĝas, tamen la kunvojaĝanta servisto, ŝajne, neniel kaj neniam timas, kaj sur ĉevalo li nur dormas aŭ somnolas, multfoje preskaŭ faladas de sur ĝi. Mi demalantaŭe suprenvidas, ke tio estas plej danĝera. Koro de Budho devus esti tia, [kiel mi sentis ĉi-tie,] kiam li vidas la efemeran vivon de popoloj. Hasta kaj rapidega nekonstanteco respeguliĝas ankaŭ sur mi mem. Yosida Kenkou iam versis: "Travivante ĉi mondon, mi nun scias, ke eĉ kirlotajdo sur la maro Awa-no-Naruto ŝajnus senonda, kompare kun la monda perturbo" [Yononaka wo watari kurabete ima zo siru Awa-no-Naruto wa nami kaze mo nasi].

Nokte, post kiam mi havigas al mi herbokusenon, mi elprenas skribilojn, fermas okulojn sub lampo, kaj, frapante kapon, ĝemante, poluras tiujn versojn, kiujn mi ekpensis tage je pejzaĝo aŭ iam forĵetis post verkado. Vidante tion, la bonzo, strebanta veran vojn, penas konsoli min, konjektante, ĉu mi ĉagreniĝus pro vojaĝa spleno. Li rakontadas longe pri la lokoj, kien li pilgrimadis en sia juneco, pri multe da karitato de Amitabo, pri siaj propraj spertoj, kiujn li konsideras miraklaj. Tio malhelpas min, do mi verkas nenian versaĵon.

Interalie, dum mi ne rimarkis, lunlumo eniras tra la arboj kaj tra krevo de muro kaj aŭdeblas tie kaj ĉi tie la sono de birdotimigilo kaj voĉoj de cervoĉasado. Vere, ĉi tie estas

plenplene de trista aŭtuna etoso. Mi diris, “Nu, ni regalu vinon al Luno la mastro!” Oni alportis tasojn. Ĉi tiuj tasoj ŝajnas iom pli grandaj ol ordinalaj, aldone, estas ornamitaj per fuŝe ordeseignita lakaĵo. Kvankam la tiajn ĉefurbanoj opinias senbonton kaj eĉ ne degnus tuŝi ilin per manoj, tamen ĉi tie, senatendite, ili plivigligis atmosferon, do ili ŝajnis al mi kvazaŭ belegaj jaspoj kaj juveloj. Tio dependas ankaŭ de surlokeco.

Per oro kaj lako  
Mi volus desegni  
En la luno supre de gastejo.

[Ano naka ni makie kakitasi yado no tuki]

Sur la traboponta klifpado  
Vivriske rampas interplektitaj  
Hederoj kaj cercidifiloj

[Kakehasi ya inoti wo karamu tuta kazura]

La klifa traboponto  
Antaŭ ĉio rememorigas al mi  
La akceptan riton de ĉevaloj.

[Kakehasi ya mazu omoi izu uma mukae]

Nebulo malaperis,  
Sur la klifa traboponteto  
Atentu kun okuloj malfermitaj

[Kiri harete kakehasi wa me mo husagarezu]

*Etuzin*

**La Monto Obasute** [Monto por forĵeti avinojn]

Vizio –  
Ploranta solece avino,  
La amikino de luno.

[Omokage ya oba hitori naku tuki no tomo]

Sub la dek sesa luno  
Ankoraŭ mi restas

En la vilaĝo de Sarasina.  
[Izayoi mo mada Sarasina no koori kana]

En Sarasina –  
Lunspektado daŭras  
Dum tri noktoj sen nubo.  
[Sarasina ya mi yo sa no tukimi kumo mo nasi]

*Etuzin*

Ŝancele staras  
Ankaŭ kun roso sur si  
Floro de patrinio.  
[Hyorohyoroto nao tuyukesi ya ominaesi]

Akre sentebla tra korpo  
Rafano pikagusta,  
Aŭtuna vento.  
[Minisimite daikon karasi aki no kaze]

Hipokaŝtana glano  
El provinco Kiso –  
Mia memordonaco al laika mondano.  
[Kiso no toti ukiyo no hito no miyage kana]

Adiaŭate,  
Adiaŭante,  
Nun aŭtuno en Kiso.  
[Okuraretu wakaretu hatewa kiso no aki]

**Ĉe la Templo Zenkouzi**

Ho, lunlumo,  
Kvar sektoj, kvar skoloj,  
Ĉiuj koheras nur en unuo.  
[Tuki kage ya si mon si syuu mo tada hitotu]

Elĵetataj per erupcio  
Ŝtonoj – De la vulkano Asama  
Uragano  
[Huki tobasu isi wa Asama no nowaki kana]

## APENDICO

### Vortoj pri la luno sur Obasute en Sarasina

(Laŭ la eta biblioteko de Banana ermitejo)

Allogate per reputacio de bela luno sur la marbordo Sirara kaj Hukiage [laŭ Heike Monogatari, kiun kantas Etuzin kun liuto], ĉi-jare mi nepre volus vidi la lunon sur Obasute, tial do mi ekvojiris el la provinco Mino en la dek unua tago de oka monato. Vojo estas tre longa, kaj tagoj por la vojaĝo estas limigitaj, do mi antaŭ tagiĝo dum mallumo ekiradis kaj je malfrua vespero enlitiĝadis. Laŭ la esperata projekto mi atingis la vilaĝon Sarasina ĝuste en la nokto de dek kvina. La monto Obasute situas sude de la vilaĝo Yahata je ĉ. unu leŭgo, kaj kuŝas de okcidento al sudo ne tre alte sen krudaj rokoj. La monto mem havas aspekton, nur profunde tristan. Mi bone komprenis tiun version, en kiu estas dirita “Nekonsolebla mia koro” [la frazo de la filo, forĵetanta sian maljunan patrinon laŭ admono de sia edzino]. Al mi estas malĝoje. Pensante, kial oni forĵetis maljunajn homojn, mi ploris kun larmoj, falantaj senĉese, kaj versis sekve.

Vizio –  
Ploranta solece avino,  
La amikino de luno.  
[Omokage ya oba hitori naku tuki no tomo]

Sub la dek sesa luno  
Ankoraŭ mi restas  
En la vilaĝo de Sarasina.  
[Izayoi mo mada Sarasina no koori kana]